



Novembro

1969

5/59

Listopad

Neregula dulingva cirkulero por favorantoj de Internacia Lingvo. Eldonas: Esperantista rondeto ĉe OB Měst NV Č. Dub. Redaktas: D-ro J. Hradil, Český Dub 137/III, distrikto Liberec, ČSSR. Nepravidelný dvojjazyčný oběžník pro příznivce mezinárodního jazyka. Vydává: Esperantský kroužek při OB Měst NV Č. Dub. Rediguje Dr J. Hradil, Český Dub 137/III, okres Liberec, ČSSR.

Tiu ĉi numero de nia modesta bulteno alportas referaĵon pri la Universala Kongreso (UKo) 1969 en Helsinki. Kromkutime ĝi estas presata nur esperantlingve kun necesaj klarigoj por malmulte progresintaj leganto, kaŭze spacomanko.

Toto číslo našeho skromného časopisu přináší referát o Universala Kongreso (UKo) 1969 v Helsinkách. Je mimořádně vytištěno jen esperantsky s nutnými vysvětlivkami pro méně pokročilé čtenáře pro nedostatek místa.

La UNIVERSALA KONGRESO 1969

okazis en Helsinki inter la tagoj 26-a de julio kaj 2-an de aŭgusto 1969. La kongresejo troviĝis 9 km de la urbocentro. Ĝi nomiĝas Dipoli kaj estas sufiĉe vasta por liveri lokon por ĉiuj kunvenoj. Avantaĝa (výhodná) estis la situo de la Kongresejo en la Naturo sed malavantaĝa estis perdo de la propaganda signifo. Nur la inaŭguro kaj Teatra Vespero devis okazi en la urbo. La vetero estis varmega, senduba – vera surprizo por tiuj, kiuj vestiĝis atentante nordan malvarman klimaton. Teretaĝe estis lokigitaj ĉefaj servogičetoj (stánky): la poŝto (kun kongresa solena stampilo) banko, vojaĝoficejo, 55-a UK-Vieno, kaso kaj „dokumentoj, kie la kongresanoj ricevis belan verdkoloran plastikan paperujon de FIAT kun la surskribo de la Kongreso kaj en ĝi: isignon, eventualajn biletojn por ekskursoj, bankedo aŭ oficiala akcepto, urboplanon de Helsinki, broŝurojn en Esperanto „Helsinki-filino de la Balta maro“, „jyväs kylä“, „Dipoli-Otaniemi“, „Bonan vojaĝon per trajno“, „Amika Finnlando“, „Rigardu Finnlandon“, „Tio estas Asko“, kongresan numeron de Esperanta Finnlando kaj novan kolorbroŝuron de FIAT „Per la 125 Special oni estas antaŭe“. Ankaŭ Vieno prezentis sin por la venontjara Kongreso per esperantlingva turisma broŝuro, saluto de la urbestro S-ro B. Marek kaj la unua Bulteno. En la vendejgicetoj troviĝis Fotoservo, „Norda prismo“ (esp. literatura gazeto) kaj „memoraĵoj“ (poŝtkartoj, alumetskatoloj (zápalky), cindrujoj (popelníky), mansakoj (tašky) (jam marde matene plene elĉerpitaj) kongresaj emblemoj k.a. Pli alte troviĝis la Libroservo, kie precipe finnlandaj esp.-novaĵoj estis venditaj. Diskoj estis vendataj ĉifoje en la Memoraĵa Vendejo.

L a i n a ŭ g u r o (slavnostní zahájení) okazis en Foira Halo en la centro de Helsinki. La impona konstruaĵo salutis per abundaj verdaj flagoj la kongresanojn, alvenintajn grandparte el Dipoli (kongresejo) per 20 aŭtobusoj. Ankaŭ en la ĉefa strato Mannerheimnintie, kie troviĝas la parlamento, flirtis Esperanto-flagoj. Je la 10-horo, malfermante la Kongreson, la prezidanto de UEA D-ro I. Lapenna salutis la eminentulojn de la Registaro kaj de la urbo, la diplomatojn (entute 14 el 13 landoj, en tio tri ambasadoroj) kaj reprezentantojn de registaroj kaj aliaj instancoj.

Sekvis salutparoj de la finna ŝtataj eminentuloj kaj dankoj de nia estraro. Poste salutis la Kongreson landaj delegitoj (Ĉeĥujo: s-ano Vitek, Slovakujo: s-ano Tvarožek). Post la muzika paŭzo la parolon prenis la prezidanto de UEA, D-ro I. Lapenna, kiu en sia festparolado tuŝis la temon pritraktitan en sia artikolo en „la Monda Lingva Problemo“, nome la lingvan problemon en la internacia kaj nacia sferoj. En la fino de sia parolado la oratoro diris inter alie: „Antaŭ kelkaj tagoj la homo metis sian piedon sur la dezertan surfacon de la Luno ... Devas veni la tempo kiam tiu sama homo povos viziti apudan landon kaj kompreni sian najbaron ... kiam li povas kompreni kaj esti komprenata en kiu ajn angulo de la terglobo. La ĉefa tasko de tiu ĉi kongreso kaj de la Lerneja Konferenco ... estas trovi la plej efikajn metodojn por atingi, ke tiu evento ... realiĝu kiel eble plej baldaŭ.“ Je la fino de policana orkestro de Helsinko ludis nian himnon.

Ĝenerelaj kunvenoj de UEA estis du. La unuan ĉeestis 550 personoj, prezidis s-ro E. Wensing, ĝi konsistis el du partoj. En la unua parto la kunvenon salutis reprezentantoj de 12 Fakaj Asocioj. En la dua parto D-ro Lapenna prezentis raporton pri la lingva problemoj kaj pri la movadaj problemoj. Al la diskuto, kiu devis trovi respondon al la demando pri la resanigo de la situacio, sin anoncis 23 personoj – sed pro la limigo de la kunvena tempo sukcesis paroli apenaŭ duono: ili tamen tuŝis multajn gravajn problemojn de la Movado. Posttagmeza parto de la kunveno okupiĝis per debato teme: „Esperanto–ĉu ideologia aŭ praktika instrumento“. S-ino Lapenna enkondukis la temon por la ideologia flanko, tre interese prezentante historian komparon (srovnání) de la Esperanto-movado kun aliaj idealismaj movadoj. Ŝi klopodis pruvigi, ke la Esperanto-movado ne povas ekzisti kaj flori sen ideologia bazo - dum s-ro Wensing argumentis, ke la tempo de ideologio pasis kune kun la unuaj pioniroj kaj ke la nuna epoko devas esti praktika epoko: Esperanto devas doni tujan (okamžitou) praktikan avantaĝon, antaŭ ol oni komencas ĝin lerni. Ĉi ne estas vivkoncepto, sed nur esprimilo. Oni starigis por rapida voĉdono (hlasování) tri demandojn: 1. ĉu Esperanto estas nur praktika instrumento, 2. ĉu Esperanto estas nur ideologia instrumento aŭ 3. ĉu Esperanto estas instrumento de komunikado ebliganta praktikajn servojn kun ideaj efikoj – (ĉiuj voĉdonis) por la lasta kiel la plej ĝusta. - La dua ĝenerala kunveno (vendrede posttagmeze, sub prezido de s-ro E. Carlén) grupigis (shromáždilo) 400 personojn el 20 landoj. Ĉar post la estrara raporto de la fakaj Asocioj pri la dumkongresaj laboroj (Dum la UKo kunvenis jenaj Asocioj: Agrikulturistoj, aŭtomobilistoj, fervojistoj, filatelistoj, fotistoj (foto-, filmo kaj sonbendamatoroj), instruistoj, interreligia kunveno, juristoj, kristanoj, kuracistoj, kvakeroj, Oomoto (japana religio), ornitologoj, Mondpaca Esperantista Movado, poŝtistoj, Internacia Scienca Asocio Esperantista, skoltoj, spiritistoj) - La kunveno de Semajno de Internacia Amikeco okazis sub prezido de s-ro Eric Carlén. Oni diskutis pri agado dum la venonta semajno (22-28. februaro 1970). Partoprenis pli ol 100 personoj. -

Kial ĉiam, la kongresa ĵaŭdo estis ekskursa tago. Okazis tri ekskursoj, kiujn partoprenis entute 560 personoj. La plej vizitata (240 personoj) estis la tria ekskurso, al Hämeenlinna.

La unua oficiala kaj ĝenerala programero, kiu ĉiujare estas la sabatvespera Interkona Vespere, grupigis ĉiujn jam alvenintajn kongresojn ĉe multaj tabloj en la ampleksa Baghy-salono. La homoj ne sidis trankvile ĉe la tabloj: daŭre iu serĉis iun; ceter apud ludis orkestro invitante al dancado. En bufedo estis aĉeteblaj sandviĉoj, kukoj, varmaj kaj malvarmaj trinkaĵoj. Lunde vespere en la sama salono de la kongresejo okazis oficiala Bankedo kaj Balo. La dumbankedan oficialan atmosferon varmigis kvarpersona virina jaz-ensemblo. Ĉifoje (tentokrát) la mezaĝuloj ne povis plendi, ĉar inter plej modernaj muzik-pecoj, kiel ekzemple la lastatempe tre populara „kuzaĉok“, troviĝis pluraj sentimentalaj melodioj de la kvindekaj kaj eĉ pli fruaj jaroj.

La UEA-Komitataj kunsidoj estis kvin. Ĉeestis 45 komitatanoj. Oni ĉefe diskutis pri malfavoranoj financa stato. Estis decidite (ĉiuj voĉoj por, escepte de unu kontraŭ kaj 9 sindetenoj) altigi de 20% la kotizon de la Individuaj Membroj ek de 1970. Nova redaktoro transprenos la redaktadon da „La Praktiko“ (dua gazeto de UEA), kiun oni klopodos plibonigi. Ĝi havis malprofiton de 3800 gld. La demando, ĉu UEA plue eldonados ĝin en kazo de defcito en 1970 aŭ ĉu redono al s-ro Cseh, estis prokrastita. En la diskuto oni submetis diversajn proponojn, i.a. pri la ebleco presigi diversajn dokumentojn en orienteŭropaj landoj kaj pri kolektivaj abonoj al „Esperanto“.

Elektoj. Laŭ la propono de la elektokomisiono, al la nova Estraro oni elektis (voĉdonis 45 komitatanoj): D-ro I.Lapenna prezidanto (42 voĉoj), S-ro Wensing – vicprez. (41 voĉoj) S-ro E. Carlén – vicprez. (41 voĉoj), S-ro G.Becker – ĝensekr. (38 voĉoj), S-ro Woenssing – kasisto (40 voĉoj), S-ro J.Uspienski – estrarano (42 voĉoj), S-ro J.Moritz – estrarano (37 voĉoj).

Okaza stampo estis uzata dum la tuta kongresa semajno. Ĝi estas ankoraŭ havebla sur kongrese koverto kontraŭ 1 rkp ĉe M.Glivoje, P.p.25, Zagrebačka, Dubrava, Jugoslavio.

Du sovetaj filmoj en Esperanto (unu pri Lenin, alia sudsoveta respubliko) estis prezentitaj en la kongresejo vendrede posttagmeze.

Preparkomitato por la 57-a UK en Portland (Usono) kunvenis en Helsinki sub prezido de S-ro *mar Starr* kaj s-anino C.Schulze. Oni diskutas i.a. la problemojn de manko de spertuloj en Portland, de kunlaboro kun Suda Ameriko, *k.s.* - Ekspozicio pri Esperanto en turismo estis malfermita dum la tuta semajno en la oka etaĝo se la granda magazeno „Stockmann“. - Dum la kongresa semajno radio Helsinki elsendis ĉiumatene je la 8,30 h novaĵojn el la mondo. Eĉ la Pola Radio *ĉiutagedisendis* specialaj sonraportojn pri la Kongreso.

La 29-an kaj 30-an de julio (la Urba Teatro havas nur 900 sidlokojn, pro tio oni devis ludi dufoje) la Internacia Arta teatro prezentis tri mallongajn teatraĵojn: „Vilhelmo la Konkeranto“ – unuakta tragikomedio de V.Kljakoviĉ, „Aparta ĉambro“ – unuakta komedio de C.Santelli, kaj „Hotelo“ – ŝerca sceno de B.Ĉopiĉ, ĉiujn tradukis *Srĝan Flego*. - Libervola Teatra prezentado ludis la satiron „Sonoriloj“ de la slovena verkisto Rozman. - La 19-an de julio estis prezentita la nacia Finna Vespero. Ĝi prezentis multajn naciajn kantojn kaj dancojn.

Belartaj konkursoj: pli ol 200 personoj ĉeestis la kunvenon, dum kiu oni proklamis la rezultojn de la ĉijaraj Belartaj Konkursoj, kaj kiun prezidis S-ino E.Lapenna, la sekretariino de la Konkursoj. Pro la neĉeesto de plej multaj gajnintoj, S-ino Lapenna, S-roj Roger Bernard kaj Alec Venture, membroj de la juĝkomisiono, legis kaj recitis premiitajn verkojn: Originala Poezio (gajnis Nicolino Rossi (Italujo) pro „Sondormemo“). Tradukita Poezio (Gaŭdenzio Pisoni – Italujo - pro „La domo doganista“ de Eugenio Montale), Originala Prezo (Andreo Szabo - Hungarujo, pro „La purpura ŝalo“). Originala Dramo (Edvard Tvarožek-Ĉeĥoslovakio, pro „Nokta vizito), Nova Talento (Julia Sigmond - Rumanujo, pro la originala poemo Interdivido).

La Oratora Konkurso: La Estraro de UEA fiksas por ĉi-jara Oratora Konkurso la jenajn temojn: 1.Senco de la studenta ribelo, 2.Kosma veturado, 3.Internaciismaj tendencoj en moderna filozofio kaj internacia lingvo. La juĝantaro de la komisio – R.Bernard (prezidanto), I.Osibov kaj H.Tonkin – havis sufiĉe facilan taskon, unue ĉar prezentigis nur tri kandidatoj kaj due – ĉar ĉiuj tri elektis la saman (duan) temon. Tiu ĉi facile estis tamen nur ŝajna, ĉar ĉiuj oratoraĵoj ne estis senriproĉaj, enhave, lingve kaj stile. Oni disdividi la premiojn jene: I. premio – *E.Eichhorn* (GDR), II. premio – D.Masterman (Britujo), honora distingo – R.Cash (Svedujo).

Varia Arta Vespero okazis la lastan kongresan vesperon. En la programo troviĝis tre diversaj eroj, lerte anoncataj kaj gvidataj de Harri Melasniemi, kiu, sur la scenejo, elmontris ankaŭ aktorajn kvalitojn. Unue Roland Dupuis (Svedujo) pianludis kvar verkojn de Granados, Albeniz, Chopin kaj Debussy. Sirka Lehtivaara (kun akompano de M.Oja) plenumis en Esperanto tri kantojn de finnaj komponistoj. Tre interesa estis la „japana parto“ de la vespero, dum kiu F-ino Wada *Miy-oko* prezentis per japana kordinstrumento „ŝamiseno“ kvar sezonojn de Japanujo; la ludon akompanis vorta klarigo de S-ro Umeda kaj surekranaj kolorbildoj pri japana pentroarto. Tute alian etoson, jam tute modernan, enkondukis la knabina ensemble de la Sport-Asocio de Turku per sia ritmadanca gimnastiko. Du bulgaraj geaktoroj, Belka Beleva kaj Anani Anev, Bonege prezentis du-personaj komedion de soveta aŭtorino J.Slonova „Divorco“ (Eksedziĝo). Heli Keinonen kantis „Ĉiuj homoj“ laŭ la teksto de Homaj Rajtoj kaj la teksto kaj la tekstmaniero plaĉis al ĉiuj. La programo finis per „pop-artaj“ kanzonoj, kiuj plenumi M.A.Nurminen kun sia ensembleo.

Internacia Somera Universitato prezentis 9 elstarajn lekciojn. Jen temoj: Dro D.L.Armand,doktoro, profesoro pri geografio, Moskvo: Racia uzado kaj konservado de la naturfontoj de nia planedo. - D-ro Italo Chussi, profesoro kaj doktoro pri matematiko, tradukinto de „La Nobla Korano“ en Esperanton – Esperanto kaj Islamo. - D-ro E.Kääriäinen, doktoro filozofia kaj profesoro de Geodezia Instituto de Finnlando: Pri la formo kaj grandeco de la terglobo. - D-ro Ivo Lapenna, docento pri kompara soveta kaj orienteŭropa juro en Londono: Internacia juro kaj mondpolitiko. - D-ro inĝ. Oton Pancer: Tipo de agrikulturaj kaj hortikulturaj entreprenoj. -

